# EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

**ENHAVO n-ro 2** > • IFEF kun ni •Z-festoj • UEA salutas • Afrika bulteno • Israelo < jan 5

## IFEF alvagoniĝas al nia EKO-familio

EKO kun ĝojo anoncas la aldonon de nia fervojista federacio al la tradicia duo de UEA kaj ILEI. En 2022 ni forte kunlaboros kun IFEF, precipe per la AMO-programo. Perspektive ni eble invitos pliajn Fakajn Asociojn aliĝintaj al UEA aliĝi al nia subtena kolektivo. La subteno estas dudirekta – ankaŭ ni konigas iliajn projektojn al pli vasta publiko ol nur ilia propra membraro. Pli forta faka agado estas afero por ni ĉiuj!

## Zamenhofe refoje – Italio festis

**Pescara**: en la sidejo de la asocio Italia Nostra Michela Lipari intervjuis prof. Davide Astori pri liaj tri novaj libroj: *Dante in esperanto* (Inedit edizioni, Castel S. Pietro, BO, 2021) - interesa studo pri ĉiuj ankau partaj tradukoj de la Dia Komedio en Esperanto - *Homaranismo* (Uninova, Parma, 2021) - kiu priskribas la esencon de la esperantismo - "*Il Manifesto per la Terra*" (Athenaeum, Parma, 2020) - kiu ligas la lingvon Esperanto al la ekologia agado por defendo de nia planedo. ĉiuj dulingvaj eldonitaj de ne esperantistaj eldonejoj.


**Tutitale:** enkadre de la tradiciaj monataj eventoj de IEF, la decembra estis dediĉita al Zamenhofoj, kun partopreno de la pranepino Margaret Zaleski-Zamenhof, Carlo Minnaja kaj Roman Dobrzynski. Inter la plurlanda aŭskultantaro intervenis ankaŭ Ursula kaj Beppe Grattapaglia; kunordigis la vesperon Michela Lipari.

**Eksterenrigarde:** "Stese per le tesi" kiu klopodas prezenti al sia publiko per ĉeestaj kunvenoj kaj per elsendoj per *facebook* la aŭtorojn de plej interesaj universitataj disertacioj, decidis omaĝi al Zamenhof, elsendante la 15an de decembro unuhoran intervjuon, en la itala, de Debora Rossetti, respondeca pri la sociaj retejo de IEF, Mario Migliucci, aŭtoro kaj aktoro en la itala kaj en Esperanto, Irene Caligaris, doktoriĝinta ĉe la Torina universitato per disertacio pri Esperantujo, kaj Lorenzo Di Michele, doktoriĝinta ĉe la roma LUISS per disertacio pri la rolo de Esperanto, kaj Michela Lipari, respondeca en IEF pri okazigo de gravaj eventoj.

---

**La jaro 2022: Jen tio muzike: kunkantu: DU DI DU DU!**

Dankon al Perlo Miela pro la notoj



# Bjalistoko festis

Malgraŭ la pandemio, de la 9a ĝis la 12a de decembro 2021 en Bjalistoko post la pastintjara paŭzo denove okazis la 22aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj kun riĉa kleriga, kultura kaj ekskursa programo. Legu pli en "La Ondo de Esperanto https://sezonoj.ru/2021/12/polujo-5/

# ESF jarfine komunikis

*Esperanto Studies Foundation:* Chuck Mays: **Jarfina ESF-ĝisdatigo 2021**
https://esfconnected.org/2021/12/20/jarfina-2021/

# UEA bondeziras por la nova jaro

**Unueco, espero kaj amikeco** daŭre restu la fortoj, kiuj nin movas - nun kaj estontecen. Jen kion nome de UEA ni deziras al ĉiuj homoj en la mondo, jen por kio ni laboras. Dankon por ke vi estu parto de tiu movado por Esperanto kaj por mondo pli bona. En 2022 (re)aliĝu al UEA: https://uea.org/alighoj/alighilo. Pro vi UEA ekzistas. #Esperanto #NiaLingvo #Feliĉan2022




## Informlingvoj en du malsufiĉe atentataj gravaj lingvoj

La prezidanto de ILEI, Ahmad Mamduhi,  komunikas pri novaj kursoj.

https://www.espero.ir/eo/esperanto-kurso-araba/ estas filmoj de arablingva Prezenteto de Esperanto kune kun kvar unuaj lecionoj de la Rekta Metodo de kara Stano Marĉek. La voĉo estas de arabino, kiu iam lernis Esperanton ĉe mi.
En UEAviva (la jutuba kanalo de UEA) estas filmoj de du serioj de instruado de Esperanto per la svahila/sŭahila surbaze de libro de kara prof. Nino Vessella: unu fare de li mem, la alia per d-ro Byelongo Elisee Isheloke.

## Esperanto en Afriko: jarŝanĝa eldono

La plej freŝdata numero de “Esperanto en Afriko" legeblas aŭ elŝuteblas per https://www.esperanto-afriko.org/bultenoj. Ĝian enhavoliston konsistigas:

p.1 Enkonduko,
p.1 Zamenhofa festotago en Antananarivo
p.2 Nova estraro en DR Kongo
p.2 Kerno de nova junulara agado en Madagaskaro
p.3 Kampanjo Hans Bakker en Senegalo
p.3 Nova E-filmeto en Burundo...
p.3 … kaj ankaŭ en DR Kongo
p.4 Afrika retejo renoviĝis kaj funkcias
p.4 E-Klubo Sunleviĝo dankesprimas
p.5 La burundano Aimé-Patrick M. diplomiĝis E-instruisto
p.6 2022 en Senegalo
p.7 Kvazaŭ korpo sen koro, nova afrika E-filmo
p.8 Afrika Komisiono kaj retkunvenoj
p.9 Ekzemplo de laboro de la Afrika Komisiono
p.9 Kameruno kongresis
p.10 Afriko nekrologas

Belan jarŝanĝon kaj feliĉan novjaron al vi!

Adjévi

## Pola progreso kaj kongreso en 2022




Aperis la sesa numero de *Pola Esperantisto*, en kiu inter multa valora enhavo aperas programo por la 39a Pola Esperanto-Kongreso, kiu okazos inter la 23a kaj 26a de junio 2022 en la urbo Łódź (prononco tre proksimume ‘vuĝ’

## Distancenrigarda kunveno en Tel Aviv

Rekorda nombro de ĉ. 50 personoj spektis la hibridan programon pri la lanĉo de la spacteleskopo *Webb* hieraŭ en la Tel-Aviva klubo. Tamen la plejmulto estis eksterlandanoj, kiuj partoprenis per Zoom. Estis Eo-versio de la hebrelingva prelego de Amri dum la lanĉo (kiun spektis pli ol 160 personoj) kaj komentario pri la oficiala lanĉo-video de NASA, kun multaj demandoj kaj reagoj. La tuto estis registrirta kaj haveblas en la jutubo-kanalo de ELI: https://www.youtube.com/watch?v=dfShM2OKkRk.

Amri W.

========= vortoj: 750 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **17a aŭgusto 2021** (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.